# B U L T E N O DE

LABORISTO LIGO ESPERANTISTA EN ČEHOSLOVAKIO

JARABONO POR ČSR Kč 6,- POR EKSTERLANDO 4 RESPONDKUPONOJ POR MEMBROJ DE UNUIGITAJ LIGOJ "L.L.E." PLZEŇ KAJ "Č.L.A.E." ÚSTÍ N/L: SENPAGE.

POŜTĈEKA KONTO DE L.L.E. PLZEŇ 87.136 PRAHA DE Č.L.A.E. AUSSIG A/E: 45729 PRAHA

---

ADRESO LABORISTA LIGO ESPERANTISTA, PLZEŇ, PEKLO ČSR

---


12a jarkolekto. A P R I L O 1938. nro. 4

R a d i o s t a c i o

K A R L O M A R K S : halo . . . . . . . halo . . . . . . . halo . . . . . . .

A t e n t u , ge-kdoj, vi, ruĝaj lab.

esperantistoj !




Ni salutas la membrojn de LLE – Plzeň kaj ĈLAE – Aussig kaj ĉiujn aliajn ge-kdojn en en- kaj eksterlando.

Frate estu salutataj la ge-kdoj kaj gastoj venontaj al la XVIIa jarkunveno de LLE en Plzeň, sen diferenco de nacieco kaj partieco.

En d e m o k r a t a lando, je demokrata gvidado vi kunvenas por raporti pri la dum la lasta jaro farita laboro kaj pri niaj estontaj taskoj.

Ni salutas ĉiujn laboristojn, kiuj uzas Esperanton por pli justa sociordo, ankaŭ la multajn aliajn subtenantaj niajn klopodojn.

Je la hodiaŭa tago, ni ankaŭ klinas niajn kapojn antaŭ la mortintaj ge-kdoj de Viena, Februaro 1934, la heroaj ankoraŭ batalantaj ge-kdoj en Hispanio, batalantaj por justo, libero kaj demokratio
la ĥian popolon, batalanta por sia libereco kontraŭ la japana imperialismo !

Ni neniam forgesos vin, sed ........................... venos tago de l´repago!

Vi ĉeĥoslovakaj lab. esperantistoj hodiaŭ kunvenas, fruktodona estu via laboro al la bono de la lab. esp. movado, la kulturmovado de la laboranta proletario en ČSR. Al la multaj aliaj flankenstarnt aj ge-kdoj ni alvokas: Venu al ni, faru LLE Plzeň al fota influriĉa lab. esp. organizo en ČSR. Laboristaj esperantistoj en Ĉ e ĥ o s l o v a k i o unuigu vin en Laborista ligo Esperantisa Plzeň!

Nia v o k o : !! U N U I G U V I N ! Ne estu n e u t r a l a j ! Komune ni marŝu, b a t a l u kaj se devas esti, f a l u !

LIBERECON, EGALECON, FRATECON, al ĉiuj esperantistoj
de bona volo!

--------------

laboras ĉiuj faŝistoj. Esperanto estas pac -
POR LA PACO . . . . . . . . . batalilo, sed . . . Hitler kaj Henlein estas ĝias kontraŭuloj. La sudetgermana Heinleimagazetaro skribis artikolon k o n t r a ŭ E s p e r a n t o .

Do vi, neutralaj esperantistoj ĉu na kaŭzo por indigniĝo kaj kiel vi pensas pri sekvanta poemo elgermanigita, ĉu ankaŭ laboro

p o r l a p a c o ?

Kiamaniere la faŝistoj edukas la junularon, troviĝanta en ilia tendaro, tion plej evidente montras la sube citita fiverso, aperinta en la "Jungen Jahrweiser 1937 de la Henleina germana gimnastikasocio".

Apenaŭ, ke la knabetoj iom klare povas balbuti la nomoj de siaj gepatroj, jam certaj fiuloj encerbigas al la etuloj mortglorigajn ideojn. Tiaj senhontaj kaj sadismaj ideoj de la nuntempaj kulturportantoj nin plen kreskuloj jam tute ne surprizas, ĉar ni apertas sufiĉe pri ili en la ĉiutaga vivbatalo, sed por la alkreskanta generacio ili estas danĝero.

Estas niaj plej sankta devo, kontraŭbatali tiajn, al homoj ne indaj ideojn.

Ni vane atendados je certa savonto de tiu ĉi mense malsana mondo, la savontoj estas ni mem:

MI, VI kaj Ĉ I U J, kiuj sentas je sia propra korpo kaj menso la premegon de la reakciularo.

NI ekagu pli intense ol ĝis nun, ĉar la tempo urĝas ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! ! !

Mi ne forgesu la okazintaĵojn en ITALIO, GERMANIO, HISPANIO kaj antaŭ kelkaj tagoj en Aŭstrio, la samaj danĝeroj ankaŭ minacas nin. - Kaj jen la fiverso kiu instigis min al tiu ĉi artikolo:

"Mort de Flandruj mi vokas vin,
Aŭskultu kaj ekprenu min !
Via venkkantad tratondru min,
Via vunddolor traĝemu min,
Vi homropant mortigu min !
Mi, mort de Flandruj
salutas vin!

/originale de A.K. - Gablonz./

## S L O V A K I O ! A.B.

En Bratislava estis aranĝita kurso pri la viva verko kaj filozofio de prezidinto liberiginto M a s a r y k . La kurso estis tre enhavriĉa. Prelegis kelkaj universitataj profesoroj. Ankaŭ estis aranĝis ekspozicio "La vivo de Masaryk en bildoj !" Interesa.

## PELITA en la MORTON el Arbeider Esperantisten, Norvegio.

De la esperantogrupo "Fremad" en Trondheim ni ricevis kopion de du L, kiuj okulfrape montras al ni la gravon kaj signifon de Esperanto en internaciaj rilatoj. En ĉi tiu kazo, helpe de Esperanto, oni sukcesis havigi informojn pri kontraŭfaŝisto, kiu, pro siaj opinioj, estis pelita en la morton de la Gestapo. Pro limigita loko ni ne povas presigi la L en sia tuteco, sed nur fari eltiraĵon. Temas pri jeno: Esperantoinstruisto nuntempe kursanta en Norvegio, ricevis daŭrajn petojn de s-ino kies edzo, pro Esperanto, devis dum septembro 1937 forlasi Germanion. La malaperinto, Karl Cerjak, el München anoncis sin oktobre en Osijek – Jugoslavio Arbeiter Heberwachungastelle. Pro Esperanto kondamnite al 13 monata malliberejo, li estis transigita Ĉeĥoslovakion, ĉar tie li naskiĝis. Tie li tamen ne ricevis laborpermeson. Kiel ĉasita hundo li marŝadis suden kaj atingis Osijek psike malsana intencante sin mortigi. Ĉu la diabla besta Gestapo lin pelis morten estas laboro farenda esplori de niaj samideanoj. Klariginte ĉion, la Trondheima grupo skribis al Jugoslava Esp. ligo, Zagreb, finanta la L jene: "Per Esperanto ni helpu niajn lingvanojn, kiuj ege suferas en multaj landoj. La solidareco internacia ŝirmu la viktimojn, kiuj spite ĉion flirtigas niajn verdajn flagojn. -- Provu ricevi el Osijek informon. Mi, kune kun mia esp. grupo tutkore dankas al vi pro rapida helpo. De la esp. grupo Osijek, Jugoslavio, la trondheime klubo ricevis L datitan de 18/12/37 el kiu ni ekstraktas la plej gravajn alineojn: Ni ne povis tuj doni al vi respondon, ĉar ni devis unue esplori la aferon kaj informiĝi en la lab. tranoktejo kaj ankaŭ ĉe la polico pri la adreso de via kdo.

Daŭrigota.

G R A V A J  I N F O R M O J pri la la laborista esp. kongreso !

En la lasta Bulteno ni sciigis el nia anaro kaj legantaro, ke ni decidis aranĝi la Ian tutlandan kongreson de lab. esp. en Plzeň la 2an kaj 3an de julio 1938. Sed dum la lastaj tagoj pritraktis la lab. kulturaj organizoj en Plzeň, ĉu ne estus pli bone aranĝi okaze la 6an jubilean laboristan industrian ekonomian ekspozicion en Plzeň

"Komunan kulturan tagon".

Post reciproka kompromiso de ĉiuj laboristaj kulturaj organizoj, estis decidite aranĝi la "komunan kulturan tagon". Precizaj tagon por tiu kultura tago ne estas ankoraŭ fiksataj, sed oni proponas la daton de

6an kaj 7an de aŭgusto 1938.

Dum tiuj tagoj estus preparitaj jenaj memstaraj kongresoj de sekvontaj lab. kulturaj organizoj:

" Ligo de lab. turistoj" /naturamikoj/
" Ligo de lab. teatro-amatoroj"
" Ligo de lab. radio amatoroj"
" Asocio de foto amatoroj"
" Unio de liberpensuloj"
" lab. ligo esperantista"
" Regiona organizo de lab. kantistoj"
" laboristo akademio".

Bedaŭrinde mi hodiaŭ ne povas ankoraŭ sciigi al nia legantaro la precizan daton de la komuna tago, ĉar oni agas ankaŭ pri tio kun la kulturaj organizoj en Praha, por ke estu je ĉi tiu tago la plej granda vizito en Plzeň. Sed ni esperas, ke certe ĉiuj niaj anoj de nia ligo konsentas kun ni, por ke LLE en Plzeň, ŝanĝu la jam fokaitan daton de nia tutlanda kongreso kaj ke ni aranĝu ĝin dum la "komuna kultura tago". Por pli bona propagando de nia lab. esp. movado, estos certe pli bone, se ni partoprenos tiun ĉi tagon. Pluen ni ne devas forgesi, ke ni ricevos subtenon kaj financan helpon de la ekspozicia komitato. Ankaŭ la laborista gazetaro estos je dispono de la kultura tago, tio signifas, ke ni pli bone povos propagandi en la gazetaro nian kongreson kaj movadon, ĉar la propagando de ĉiuj entreprenoj estos komuna.

Por tiu ĉi kultura tago estas ankaŭ garantiigita la 50%a rabato je fervojoj je la ekspozicia legitimacio. Tial mi firme esperas, ke la partopreno je kongreso estos la plej granda kaj ke ĝi vere estos manifestacio de la lab. esp. por nia movado.

Ge-kdoj, ŝparu por la kongreso kaj certe partoprenu ĝin, ĉar la tagojn, kiujn vi travivos inter ni, certe estos por vi ne forgeseblaj. La nunjara kongreso estos la unua, kiun la LLE post sia 17 jara ekzisto aranĝas kaj certe ĉiu vera, klaskonscis laborista esperantisto sincere deziras, ke ĝi finu per granda morala sukceso. Sed tio ne dependas nur deni, sed plej parte ankaŭ de vi, karaj ge-kdoj, tial subtenu nin almenaŭ per la plej grande partopreno.

Vivu la Ia tutlanda kongreso de lab. esp. en Plzeň !

Por L.L.E. Plzeň – F.R.Jonák, t.t. sekr.

GE-KDOJ, estas via devo, n e p r e partopreni la XVIIan jarkunvenon de LLE okazonta la 3an je aprilo 1938 en la lab. domo "Peklo" en Plzeň. Antaŭe jam sendu viajn proponojn por la estonta laboro.

Plenu vian devon!

NI DANKAS al la redakcio de lab. esperantisto, Amsterdam, kaj al "Verda revuo" Vieno, pro publikigo de nia alvoko.

Ĉiam portu, kdo, nian lab. esp. insignon, havebla ĉe la akministracio.

NIAN PRESFONDON subtenis:

ge-kdoj:

| | |
|---|---|
| E, Klim, Dolní Sucha | Kč 1.5 |
| A.Štefánková, Železník | 4.- |
| J.Bergmann, Gablonz | 5.- |
| Ing. Wilhelm, Praha | 10.- |
| Novotný, Tanvald | 4.- |
| J.Gobelt, Vejprty | 4.- |
| John, Nové Zámky | 4.- |
| Rebíček, Olomouc | 4.- |
| J.Sirotka, Košťany | 8.- |
| lab.esp. asocio, Langenau | 10.ë |

Des pli multe vi subtenes la presfondon, des pli frue ni povos aliformigi kaj riĉigi la Bultenon! Do ekagu, ge-kdoj!

LLE. - al tiuj ge-kdaj, kiuj
k o n c e r n a s !

Jam estas a p r i l o, imagu kaj tamen estas multaj ge-kdoj, kiuj ankoraŭ ne plenumis siajn devojn kontraŭ la l i g o, pagintaj la kotizojn por la jaro 1937. Tiun ĉi manieron, ŝuldantaj la kotizon, kiujn la ligo bezonas por bone funkcii, ni neniel povas laŭdi kaj ne estas komparebla kun sindonemo kaj oferemo k helpo al la ligo.

Ni pro tio ankoraŭ e g e petas la ge-kdojn ĝis nun ne pagintajn kaj la abonantojn de nia Bulteno, ke ili
t u j pagu la malaltan kotizon de Kč 6.- por la restanta kaj nuna jaroj. O r d i g u viajn ŝuldojn TUJ vi per tio pli multe helpas al la ligo ol vi p e n s a s.

Neforgesu je niaj nunjaraj entreprenoj, kiujn ni devas financigi kaj ni nepre bezonas monon por fari denove paŝon antaŭen en la lab.esp. movado.

HELPU ! KUNLABORU ! TUJ !

ĈLAE- Ni atentigas niajn liganojn ke la nunjara VIa jarkunveno okazos la 15an de m a j o 1938 en Langenau. La tieaj kdoj jam preparas la aranĝadon! Proponojn sendu ĝis plej malfrue la 30an de aprilo al la ligo.

Ge-kdoj, ĉu vi scias, KE vi bone kaj senkoste propagandas elpendigante lab.esp. gazetojn en publikaj legejoj:

Ke: necesas komune batali por pli oftaj radiodissendoj proletsende precipe per stacio "Mělník".

Ke: la brnaj esperantistoj disaŭdigas ĉiun Ian ĵaŭdon en la monato

Ke: vi ne forgesu sendi al la hisp. ge-kdoj esp. materialon por ekspozicio en la tranĉejojn de Madrid.

Ke: ĉiu esp. vidkesteto estos forigenda, se vi ne kapablas plenigi ĝin per taŭga materialo.

Ke: dank al la klopodoj de la kontraŭfaŝista Esperanto komitato de Katalunujo, la kataluna registaro denove permesis disaŭdigi komunikojn kaj opiniojn pri la batalo de hispana popolo kontraŭ la internacia faŝismo. La esperanto paroladoj de nun okazos regule ĉiu Sabate inter 23.30 kaj 24a nokte ondo normala 377 metroj kaj la ondo korta de 42 metroj.

A Ŭ S K U L T U k dankskribu !

! K O N K U R S O !

je kiu partoprenu ĉiu kdo kaj kdino kapeblaj verki aktualajn artikolojn. Vian laboron sendu plej baldaŭ por ke ni povu reposi en ĉiu B-nro 1 artikolon, pri kiuj decidos la legantoj de 1a B kiu estas la plej bona kaj al kiuj apartenu 1a 3 premioj, dediĉataj al la plej bonaj laboroj.

La titolo de la artikolo estu "Kiel ni, laboristaj esperantistoj povas kunhelpi defendi nian respublikon?

La L enhavu vian plenan adreson kaj pseudoninom, sub kiu ni represos vian laboron, kiun sen du al la Bulteno redakcio: K-do Ant.J.Schiller, Varnsdorf V. Am Graben nro. 1921 Č.S.R.

Ekagu, ge-kdoj ! Kunlaboru !

A D R E S O J de ge-kdoj, kiuj dez. interŝ.
Poŝtmarkojn: C. Van Holst, ROTTERDAM, 14 BI de Kempenaerst. Holando. K-do Marceau Dryburgh, 7 rue de Wagram, LILLE /Nord/ Francio. K-do J.Hansson, tramisto, Birjer Jarlsgatan 16 Göteborg, Svedio.

_

Dez. Respondi: Juna hispana kdo kun k-dinoj el ĉ.l. pri div. Temoj, R.C. K-do Antonio Marco, Lenin 79, Callosa de Segura, Alicante Hispanio. Ĉe-fronta kdo kun kdoj el div. landoj. R.ĉ. Vincente Roglá, 136 Brigada Mixta, 542 Bat. P.M. Estafeta 68, Sector Centro, Hisp. Via Cerber.

REDAKCIA LETERKESTO: De lab. filatelisto, ano de nia movado ni ricevis la demandon, ĉu ne estas k-doj en niaj lignoj havantaj intereson je fondo de lab. esp. filatelista sekcio. Ni sciigas al la kdoj, kolektantaj PM, en nia ligo, ke ili sendu siajn opiniojn pri la propono al la Bulteno kompilanto, kiu laŭ la alvenontaj respondoj informos, ĉu eblos krei filatelan sekcion en LLE aŭ ne. Skribu tuj.

Redakcifine ni ricevas la sciigon el Austrio, ke E-organizoj estas malpermesataj. Komentario superflua! Sed ni duobligu nin!